

LA TANGO DE L'ROZOJ

A. Bottero/F. Schreier
Esperantigo: Emanuele Rovere

Tie, en la ĝarden' de rozoj,
naskiĝis granda amo,
okazis kisoj, aŭdaciaj tuŝoj
kaj la frenezo de la pasi'.
"Amu min" ŝi flustras arde
kaj la deziro tremigas ŝin,
dum ŝvebas, en mallum',
de rozoj la parfum'.

Amu min, kisu min kun pasio,
prenu min kaj stringu min kun ardo.
Pluku min, similas mia vivo floron,
ĝi frue floras, frue velkas: jen amo mia por vi.

Poste, venis malĝoja tago,
finiĝis tiu amo
samkiel rozo de frost' mortinta,
kies parfumo ne ŝvebas plu.
En ĝardeno sen plu rozoj,
ŝi konsumiĝas en malesper',
plorante pro ĉagren', dum ehas la refren'.

Amu min, kisu min kun pasio,
prenu min kaj stringu min kun ardo.
Pluku min, similas mia vivo floron,
ĝi frue floras, frue velkas: jen amo mia por vi.